

Kio okazos en 1985 ĉe Kultura Centro Esperantista?

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 januaro 03 kaj 05.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-137/Radiokasedo-137-2-860-1985-1a-elsendo-Claude-kaj-Andree-GACOND-Kio-okazos-en-1985-che-Kultura-Centro-Esperantista.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Komence de nova jaro ni pensas interesi niajn geaŭdantojn, per la prezento de la esperanto-aranĝoj okazontaj en la urbo La Chaux-de-Fonds ĉe Kultura Centro Esperantista.

A.- Dum tiu ĉi vintro finiĝos grava konstru-periodo en la historio de Kultura Centro Esperantista kaj de ties Gastejo Edmond Privat. Kiel ni jam plurfoje raportis, sep domoj estis akiritaj, modernigitaj kaj transformitaj cele al la starigo de renkontiĝejo, kiu nun posedas sesĉambran administrejon sufiĉe racie ekipitan, unu kunvenejon por trideko da personoj, studejon por dekkvino da gelernantoj, manĝejon por kvardeko da personoj, kiu estas nun en finkonstruo, kvindekse litojn sub formo de du unulitaj ĉambroj, naŭ dulitaj ĉambroj, kvar kvarlitaj ĉambroj kaj kvin feri-loĝejoj.

Cl.- Ĝis nun ĉefe nesalajritaj bonvoluloj funkciigis tiun ĉi kulturen centron kaj ties gastejon, kiuj ekstarigis en La Chaux-de-Fonds en julio 1974, do antaŭ deko da jaroj. Ekde aŭtuno 1982 la Centro dungis esperanto-instruiston, kiu nomiĝas Stefano Keller. Tre verŝajne vi aŭdis lin raporti pri la esperanto-instruado, kiun li plenumas ankaŭ en Srilanko, kie li nuntempe denove restadas.

A.- Stefano Keller ellaboris kun mia edzo instru-metodikon, kiu ricevis la nomon de Moderna Cseh-Metodo. Per instru-rimedo aŭd-vidaj, perbildaj, pergestaj kaj programitaj tiu metodiko rapide paroligas la esperanto-komencantojn kaj ankaŭ rapide ellernigas la lingvon al la progresantoj. Ĝi tutcerte reprezentas signifoplenan antaŭenpaŝon en la esperanto-instruado.

Cl.- Ekde novembro 1984 la Centro dungis novan kunlaboranton, kiu ankaŭ estas kompetenta pedagogo kaj samtempe kapabla administranto. Li nomiĝas Michel Frésard. Antaŭ tridek jaroj li kunfondis la asocion Esperanto-Edukistaro de Svislando, antaŭ ol iri en Kolombion, kie li doktoriĝis kaj instruis la francan lingvon en universitato. Vi aŭdos lin la venontan semajnon.

A.- Ekde aprilo 1985 la Centro havos kuiriston-intendanton, kiu nomiĝas Nicolas Grebar. Tiu junulo, profesie bakisto, estas vic-prezidanto de la junulara sekcio de Svisa Esperanto-Societo kaj gvidanto de la semajnfinoj de la bona volo, kiuj tiom kontribuis al iompostioma konstruo de la Centro.

Cl.- Ĉio tio signifas, ke ekde aprilo 1985 la gastoj ne nur povos tranokti en la Centro, sed ankaŭ povos ricevi je modera prezo kompletan pensionon. Tio ebligas plani kursojn, staĝojn, kolokvojn, seminariojn kaj feriojn, kiuj nur povos altiri en la urbon La Chaux-de-Fonds kreskantan nombron da esperantistoj studemaj aŭ simple feriemaj kaj turismemaj. Oni troviĝas en tre bela montara regiono.

A.- La jaro 1985 komenciĝis kun la nun tradicia vintro-feriado, kiu estis dediĉita al skiado kaj astronomio. Kaj tuj poste, ekde la mezo de la monato januaro viciĝos semajnfinaĵ aranĝoj kaj tutsemajnaj kursoj. Jen kelkaj informoj pri la ĉefaj:

Cl.- Kiu deziras eklerni esperanton aŭ progresi en la studo de tiu lingvo, tiun nepre kontentigos la esperanto-staĝoj, kiuj disvolviĝas la lastan kompletan semajnon de ĉiu monato kaj dum la tuta somera feri-periodo. Ekzistas detala informilo, kiun oni povas peti tra la kanalo de Svisa Radio Internacia.

A.- Kadre de sia Internacia Feria Altlernejo (IFA), Kultura Centro Esperantista (KCE) organizas la ĉi-sekvajn kursojn kaj seminariojn, por kiuj ankaŭ ekzistas detala informilo. De la 6-a ĝis la 11-a de aprilo, tio estas do dum la paska semajno, okazos seminario pri la lingvo-minoritatoj en Eŭropo. Ĝin gvidos Uwe Moritz.

Cl.- Dum la pentekosta semajno, tio estas de la 27-a de majo ĝis la unua de junio Bernhard Eichkorn gvidos seminarion pri la nomoj de la sovaĝaj floroj. Paralele disvolviĝos esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj kaj tre verŝajne restado de la bona volo, kaj posttagmeze ĉiuj havos la okazon migradi por observi natur-belaĵojn.

A.- Ekde la 15-a de julio ĝis la fino de aŭgusto senĉese disvolviĝos kursoj. Kelkfoje okazos samtempe tri aŭ kvar kursoj. Jen ilia listo:

Ed Borsboom prelegos pri Andreo Cseh en ĉiuj facetoj: vivo, pedagogiaj laboroj, propagandaj verkoj, ceteraj laboroj kaj influo. Poste Herbert Mayer prelegos pri la satiroj kaj utopioj en la esperanto-literaturo, dum paralele mia edzo gvidos seminarion pri la perbilda instruado de esperanto. La postan semajnon István Szerdahelyi gvidos interlingvistikan seminarion, kies titolo estas; "La formala kaj enhava analizo de la Universala Vortaro - Enkonduko en la Etimologion de Esperanto", dum paralele mia edzo gvidos seminarion pri la aŭd-vida instruado de esperanto.

Cl.- La partoprenantoj al ambaŭ aranĝoj kaj al la esperanto-staĝoj povos karavani al la Universala Kongreso en Aŭgsburgo.

A.- Ankaŭ karavane kongresanoj povos veturi al La Chaux-de-Fonds por sekvi trian pedagogian seminarion, kiun mia edzo dediĉos al la per-teksta instruado de esperanto. Paralele Dirk Willkommen gvidos tradukseminaron dusemajnan por germanlingvanoj. Kaj Georges Lagrange gvidos alian tradukseminaron por franclingvanoj. Kaj fine, Michel Frésard gvidos seminarion de perfektigo en la franca lingvo.

Cl.- Dum la tuta jaro okazas principe je la lasta plena semajnfino de la monato studa semajnfino kun tri grupoj: klasoj de komencantoj kaj progresantoj kaj prelegoj por esperanto-parolantoj. Ekzistas speciala informilo pri tiuj ĉi aranĝoj, kiuj povas agrabligi feri-restadon.

A.- Apud tiuj studaj semajnfinoj mi menciis la pedagogiajn semajnfinojn, kiuj disvolviĝas je la ritmo de po tri aranĝoj en la jaro.

Cl.- La semajnfinoj de la bona volo ĝenerale okazas du semajnojn antaŭ la studaj semajnfinoj. Pri ili ankaŭ ekzistas speciala informilo, kiu ankaŭ alportas sciigojn pri la laborrestadoj de la

bona volo, kiuj disvolviĝos fine de majo kaj komence de junio, komence de julio kaj fine de aŭgusto, ĉiam dum po du semajnoj. Tiu informilo sciigas, ke helpemuloj estas bonvenaj por pli longaj periodoj maksimume du-monataj.

A.- Apud tiuj kurs-periodoj la Centro estas daŭre malfermita al feriemuloj kaj ankaŭ al esperanto-studemuloj. Esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj estas organizataj, kiam sinanoncas grupoj de almenaŭ dek interesataj membroj. Kial ne organizi unu el tiuj karavanoj por via loka aŭ landa esperanto-asocio? Se vi provos, vi konstatos, ke estas pli facile varbi favore al tiu feria restado en Svislando ol por tradicia vesperkurso en la propra urbo.

Cl.- Kiel novjara saluto, vi aŭdis raporton pri la esperanto-aranĝoj okazontaj en Svislando dum la jaro 1985. Estis elsendo de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi, ĝis reaŭdo dum la tuta jaro !

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*